


Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA



Fasado de Sankta María la Granda, en Pontevedra

Foto: Pintos, Pontevedra. Publikita per afabla permeso de la Arhivo de la Pontevedra Muzeo.

BOLETIN
DE LA
FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Adreso de la Redakcio kaj Federacio:
Str. Marqués de Caro, 6
VALENCIA (Hispanujo)

Mensendojn adresu al:
S-ro Ernesto Guillem - Str. Marqués de Caro, 6
Valencia (Hispanujo)

Ĉiuj membroj de HEF ricevas unu ekzempleron.
Membrecio: 25, 60, 100, 150 pesetojn, jaro.
Eksterlandaj abonooj:
Minimume, 60 pesetojn, por tutjara abono.

Korespondaj anoncetoj: 10 pesetojn aŭ du
respondkuponojn ĉiu 20 vortojn aŭ frakcio.
Pri aliaj anoncoj, bonvolu peti informojn.

NOTO DE LA REDAKTORARO

En nia pasinta numero, unua de nia ek-laboro enŝoviĝis pluraj redakt—kaj pres—eraroj.

Anstataŭ plendojn kaj kritikojn, ni nur ricevis gratulojn. Tio pruvas ke nia legantaro bone konscias pri nia bonvolemo kaj toleras nian etkapablon.

Tamen, ni penos, daŭre, por prezenti pli kaj pli altnivelajn atingiĝojn, indajn de nia klera legantaro kaj alproksimiĝantajn de tiuj kiujn, majstre, prezentis, ĝis nun, samideano Hernández, nia elstara verkisto, ĵus forlasinta la redaktorecon de nia Bulteno.

Dankon pro via bonvolo kaj toleremo!

Eldonkvanto: 1.200 ekzempleroj.

Aliĝu al la
**45-a UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO**
(Bruselo: de la 30-a julio ĝis la 6-a aŭgusto)

Lasta limdato: la 30-an de junio 1960

Aliĝu al la Cseh-Seminario!

Partoprenu en la Oratora Konkurso!

Ekzameniĝu okaze de
la Internacia Ekzamenoj!

JEN SEKRETARIO

En nia pasinta numero ni parolis pri du taskoj de HEF. Hodiaŭ, ni insistas denove pri la pliiĝo de la membraro, ĉar tiu estas gravega tasko.

Multaj estas tiuj, kiuj aŭskultis nian alvokon kaj varbis novajn membrojn; entute, la varbitoj superas centon, kaj pro tio ni povis plibonigi iomete nian Bultenon, almenaŭ, materie, ĉar, alie, ni ne kapablas, kaj, meditando afero, preskaŭ sen variiĝi la koston de la ekzemplero.

La tuta kosto de «Boletín», konsistas el du partoj; unu varias laŭ la nombro de ekzempleroj, kaj alia sendependa de tiu nombro (kompostisto, klisoj, interŝanĝoj, k. t. p.). Ni studis grafike la aferon kaj trovis ke ni laboras tiel ke ĉiu pliiĝo de la membroj reduktas la koston laŭ rimarkinda kvanto. Tiun diferencan ni povas uzi por plibonigi la Bultenon, aŭ por kovri aliajn elspezojn, kiujn ni ne kovras nun, aŭ kovras malbone.

Pensu, ni ĉiuj, ke la plibonigo atingita estas fero, nur de kelkaj; tamen, ĉiuj partoprenis ĝin; kaj tiuj kiuj ankoraŭ ne alportis al niaj vicoj unu nova membro, devas mediti kaj agi konsekvence.

Eble, iu ne povas helpi nian Federacion tiamaniere, kaj, tial, ni ne povas postuli lian helpon; sed, ĉu vere estas iu kiu ne povas? Per nia speciala kotizo, aprobata en nia pasinta Kongreso en Málaga, 25 sensignifajn pesetojn, ĉiu el ni povas abonigi iun el niaj korespondantoj, amikoj, lernantoj plej studentaj, interŝanĝi kun revuoj eksterlandaj, k. t. p.

Se ni atingos la jam proksiman nombron, mil, por nia membraro, antaŭ ol fini la jaron, ni povos daŭrigi tiun specialan kotizon. Se ne eble ni estos devigataj paŝi malantaŭen.

Ni jam estas 800 membroj; do certe, ni atingos 200 deziratajn novajn membrojn.

Kaj, se ni ĉiuj klopodus iomete, kial ne superi tiun nombron?

A. PEREZ, Secretario

EVOLUCIÓN IDIOMÁTICA

En el correr de los siglos, los idiomas evolucionan, hasta el punto de que la observación cuidadosa de un texto permite reconocer, con error mínimo, la época en que fué redactado.

Nuestro idioma, desde su inicio, al originarse por una corrupción del bajo latín, usado por legionarios romanos, esclavos y mercaderes, ha ido tomando cierto lastre exógeno, que ha contribuído a darle su característica actual, paralela a la que acusan, también, los demás idiomas cultos. Estos, presentan, actualmente, una clara tendencia a la unificación, por enriquecimiento de vocablos técnicos y de raíces comunes a todos los idiomas cultos, que hace suponer, fundadamente, que, después de varios siglos, los idiomas se parecerán mutuamente, muchísimo más que en la actualidad.

Este fenómeno es el lógico fruto de una coexistencia cultural y técnica, que, salvo impensada hecatombe, ha de seguir produciéndose y acentuándose. Este hecho puede observarse, con mayor intensidad, en los países de aluvión humano: América, Australia, Francia e Inglaterra, en los que los pacíficos invasores van dejando, en el idioma de su país de adopción, la huella de su presencia.

No creemos, por eso, que los idiomas lleguen a fundirse en uno solo, constituyendo, así, un idioma común a todos. Aparte de la acción protectora de las autoridades políticas y académicas, sobre la pureza de los idiomas nacionales, hemos de tener en cuenta el gran poder espiritual de la tradición, la producción literaria de un pueblo, y no en pequeña parte, el prurito, muy legítimo, de conservar limpio el patrimonio idiomático legado por las generaciones precedentes. De todas maneras, la tendencia fusionista no se puede negar, y ha de continuar, lenta, eso sí, pero inexorablemente.

Y, sin embargo, la humanidad necesita, cada vez más, de esa comprensión idiomática, que ha de preceder, como premisa ineludible, a la comprensión espiritual. Lo que los mercaderes y marinos establecieron, en la edad media, dando origen a la *lingua franca*, y más tarde, en el lejano oriente, el *Fidgin*, es lo que, dando cima a los anhelos de sabios filósofos y lingüistas, realizó Zamenhof, creando el Esperanto, el idioma unificador que, respetando el patrimonio de cada idioma nacional, ha venido a llenar ese foso que, hasta ahora, ha separado a las naciones, dando posibilidades a todas las corrientes de mutuo conocimiento, de tolerancia y de paz.

CARTA ABIERTA A TODOS LOS MIEMBROS DE HEF

Si damos un vistazo al catálogo de Libroservo, fácilmente apreciamos la pobreza en obras de autores españoles, hecho debido, sin lugar a dudas, no a falta de capacidad de muchos «samideanos», sino a nuestro carácter un tanto abúlico para acometer la empresa de publicar un libro. amén de las dificultades, de todo género, hoy existentes, para publicar una obrita.

Para enriquecer con algo valioso ese catálogo, con el ánimo que me da el haber salido dos veces a la palestra para publicar mis Vocabularios, me dirijo a todos incitándoos a tomar parte, cada cual dentro de su especialidad, para llevar a cabo, en común, la realización de una obra magna cuya necesidad sentimos, no solo los de habla española, sino los esperantistas de todo el mundo.

Me refiero a la preparación del Manuscrito de «Enciklopedia Esperanta Vortaro», es decir, lo que publicó Verax en 1910, pero puesto al día; obra necesaria a toda persona culta, que, aparte de los Diccionarios de su especialidad, precisa de una obra de consulta, recopilación de las demás ramas y secciones del saber humano, para no verse obligada a comprar cuantos Diccionarios se publiquen en cada especialidad.

La empresa en sí es ambiciosa y de gran envergadura; por eso requiere la colaboración de un numeroso equipo, en el que todos tienen cabida.

¡Adelante, pues, Químicos, Matemáticos, Ingenieros, Médicos, Farmacéuticos, Naturalistas, Físicos, Filósofos, Electricistas, Ferroviarios, Marinos, Militares, Artistas, todos! Tal vez alguien argumente que Plena Vortaro Ilustrita de Varinghien será en su día un temible competidor, pero el sol sale para todos. También se dirá que un escollo difícil de salvar será la cuestión económica, mas no olvidemos que tratándose de una obra de interés mundial encontrará, sin duda, una organización internacional que se haga cargo de su edición.

Por mi parte, estoy dispuesto a colaborar con mis escasas fuerzas en la sección de Medicina y también en la árdua tarea de ordenar, juntamente con otros miembros, los miles y miles de palabras de que constará la obra.

Espero no verme abandonado en mi intento y recibir, cuanto antes, la adhesión de numerosos colaboradores, advirtiéndole que la ausencia injustificada en algunos, obligaría a los demás a sacarlos de su escondite, poco menos que a viva fuerza.

Esperantujo lo exige y estamos en deuda.

¡Adelante todos! y con vosotros, como siempre

ERNESTO TUDELA

AVISO A LOS «RADIOPITAS»

Nuestro infatigable y entusiasta amigo de Castellón de la Plana, Joaquín BATISTE JORNET (Alloza, 189), en atenta carta nos llama la atención sobre un asunto que puede ser de gran impulso para la difusión del Esperanto en todo el mundo. Se trata de la importante labor que pueden llevar a cabo las estaciones experimentales de 5.ª categoría, cuya actividad se ve limitada por las barreras idiomáticas, que no pueden ser vencidas por las ondas, por grande que sea su difusión. En «Esperanto» de UEA se hizo, hace algún tiempo, una campaña para que, por medio del Esperanto, los emisores (llamados, comunmente, en España, «radiopitas») pudiesen sobrepasar la dificultad idiomática, y, de paso, dar al idioma auxiliar una gran oportunidad para aumentar su prestigio.

Hoy, desde «Boletín», hacemos una llamada para la unificación de los emisores esperantistas y simpatizantes con el Esperanto, para que, de acuerdo con el amigo Batiste, emprendan una activa campaña para dar al idioma auxiliar una lucida ocasión para demostrar su utilidad. ¡«Boletín» está dispuesto a ayudarles en su empeño!

ULTIMAS NOTICIAS CONGRESALES

A medida que se van concretando los diversos puntos del programa de nuestro próximo congreso, se van reafirmando nuestras esperanzas en un franco éxito.

Además de la expedición de valencianos, sabemos se está formando una de catalanes y, dada la densidad y entusiasmo de los asturianos, no dudamos de que su presencia será importante. Si a esto añadimos la valiosa asistencia de numerosos esperantistas portugueses, no creemos exagerar al pronosticar un éxito de número que, en principio, pudo hacer dudar a muchos, habida cuenta de la apartada localización de Pontevedra, con relación a los más importantes núcleos esperantistas de España, a la innegable crisis económica y, no lo olvidemos, al hecho de que muchos esperantistas españoles habrán aprovechado la relativa proximidad de Bruselas para asistir al 45.º congreso internacional.

A nuestro congreso nacional, además de los extraordinarios alicientes panorámicos, folklóricos y típicos, no han de faltar los genuinamente esperantistas, que han dado brillantez a nuestros anteriores congresos. Nuestro gran orador Dr. M. Solá, como todos los años, nos deleitará con una gran magistral conferencia sobre el Dr. Fleming. Nuestro entrañable y querido capellán R. P. J. Casanovas, predicará en Esperanto, y dará, como siempre, la nota de venerable bondad que le caracteriza. Además, el Dr. Alfonso del Real Vicedecano de la Facultad de Filosofía y Letras de Santiago de Compostela, será este año el encargado de la conferencia en castellano; cumplida garantía de un alto nivel intelectual.

No resulta pues difícil deducir que el próximo congreso ha de tener una gran importancia bajo el punto de vista de nuestro objetivo idiomático; que ha de resonar fuertemente en los ámbitos culturales españoles, y además, que ha de resultar grato, muy grato, por los extraordinarios atractivos del programa, por el desmedido afán

del Comité local, y, sobre todo, por la decidida protección que las Autoridades le dispensan.

Triste cosa será para algunos, tener que esperar a que les cuenten lo que pasó, porque si Galicia es como un paraíso para el turismo, el congreso de Pontevedra ha de ser un destacado brillante en la cuenta de los congresos españoles, entre los cuales ninguno ha decepcionado, ni a los esperantistas ni a los profanos.

¿Enviaron ya su boletín de adhesión?

¿Reservaron ya su alojamiento?

BARCELONO.—Geinstruista karavaneto en Instituto de Esperanto.

Estis hazarda koincido ke deko da eks-terlandaj geinstruistoj—du anglaj kaj ok francaj—vizitis Barcelonon okaze de inaŭguro de la nova sidejo de «Instituto de Esperanto», str. Moncada, 12 (Ateneo Obreiro de Barcelona). Pro tio, oni ĝue akceptis ilin en la meciita institucio. Senbezone diri ke tiu renkontiĝo estis, por ĉiuj, vera plezuro, ĉar ĝi permesis, ne nur familian interparoladon pri diversaj temoj koncernantaj la Esperanto instruado en Francujo, sed ankaŭ pridiskuti nian universalan movadon.

Honoris nin per sia ĉeesto, la gesinjorojn Alberich, kaj D-ro J. Bremón Masgraú, elstaraj esperantistoj katalunaj.

F-ino J. Dediuj, fakdelegitino de UEA, flue kaj trafte parolis pri sia pedagogia fako kaj, poste, respondis al pluraj demandoj fare de la ĉeestantaro.

S-ino Lavallée aldonis ke Esperanto forte vekas la intereson kaj atenton de la franca junularo, kiu entuziasme lernas kaj studas ĝin.

Resume: belega festeto kiu montris la vigelecon de nia loka esperantismo.

La geinstruista karavaneto, en akompano de kelkaj samideanoj, admiris la urbajn vidindaĵojn kaj ĉefajn monumentojn.

J. ARAGAY PUJOLS

NIA INTERVJUO

Okaze de la sukceso atingita de nia lando en la Internacia Konkurso de UEA dum la Zamenhof-jaro, ni faris ĉi tiun intervjuon, kiun ni publikigas hodiaŭ, malgraŭ la prokrasto, ĉar ĝi estas interesa.

—S-ro Molera, je kio konsistas la Internacia Konkurso de UEA?

—Surbaze de determinita nombro da poentoj —laŭ kategorioj—, por ĉiu nova membro de la jaro, oni kalkulas pliigan procenton sur la antaŭa jaro. Gajnas la lando kies procento estas plej alta.

—Ĉu postulis multe da laboro atingi la premion por nia lando?

—Jes, sufiĉe. Mi skribis centojn da leteroj.

—Ĉu vi trovis kunlaborantojn por tiu laboro?

—Sufiĉajn kaj tre estimindajn. Mi ne mencias nomojn pro timo forgesi iun, sed en ĉiu urbo kie ekzistas grupo mi trovis bonan kunlaboranton.

—Ĉu kontenta por la premio?

—Multe, kaj ankaŭ mi klopodis ke la Grupoj de nia lando partoprenu ĝin.

—Kiam vi esperantiĝis?

—En la jaro 1937 kiam mi estis 14-aĝa knabo.

—Kiel?

—Knabo pli aĝa donis al mia bona amiko kaj admirinda esperantisto, S-ro José Solá Forcada, kaj al mi, la unuajn lecionojn, poste, ni solaj, pere de gramatiko Grau Casas, faris la reston.

—Ĉu iu elstara fakto en via Esperanto-vivo?

—Eble la plej bona estas mia partopreno en Universala Kongreso, kaj en du naciaj en Italujo kie ni reprezentis HEF-on.

—Pri la Kursoj, kiom da lernantoj finis ĝis nun la studojn?

—Proksimume cent, sed nun ni havas preskaŭ 300 lernantojn.

—Kiu korektas kaj respondas al la lernantoj?

Ni kunportas la taskon kun la membro de la Esperanto-Grupo Moyá, S-ro Francisco Parareda, kiu estas bonega korektanto,

—Kiel ĉefdelegito de UEA, kiel marŝas la Esperanto movado en Hispanujo?

—Bone, laŭ mia opinio. De antaŭ kelka

tempo oni rimarkas grandan intereson ĉe la ĝenerala publiko por Esperanto. Al tio kontribuis la granda nombro da artikoloj aperintaj en ĵurnaloj kaj revuoj okaze de la Zamenhof-jaro.

—Antaŭ ol fini, kion vi aldonus al nia *Boletín*?

En ĉiu numero, raporton pri determinita Grupo, komencante per la plej veterana, Frateco el Zaragozo. Due, sekcion kiu estu libera podio aŭ rubriko por leteroj al la direktoro.

—Kaj, kion vi forigus?

—Nenion.

—Fine, ĉu ion pli por niaj legantoj?

—Jes, peti al tiuj, kiuj ne estas membroj de UEA, aliĝu al ĝi, kaj al ĉiuj, ke oni propagandu niajn Kursojn per Korespondado inter siaj amikoj. Oni konstatis ke la plej efika propagando estas tiu farita de la esperantistoj mem, Al ĉiuj, antaŭdankojn!

P. S.

MADRIDO.—Resume, jen notoj pri la aktiveco de la Madrida Esperanto Klubo (M. E. K.) senditaj de S-ro Francisco Alafont Thomasa, delegito de M. E. K. por informado.

La 2-an de marto prelegis pri «Utileco de Esperanto en la moderna socio, S-ro Figuerola, ĉe Vegetarana Klubo.

La 11-an okazis koncerto de la hungara violonkoncertistino S-ino Illona, aranĝita de la Segovia Centro kaj M. E. K. La koncertistino ĝuigis la tutan aŭdantaron per propraj kaj jam famaj muzikpecoj, kaj fine ŝi estis premiita per granda gratulado de la aŭskultantoj. En la koncerto oni povis rimarki la ĉeeston de S-ro Markizo de Lozoja, eksĝenerala Direktoro pri Belaj Artoj.

La 26-an prelegis pri vivo kaj kutimoj el Japanujo S-ro Einzo Ito en la Centro de Komerca Instruado. La interesege kaj gaja parolado, akompanata de projekcio de koloraj diapozitivoj, estis tradukata hispane de S-ro Figuerola. Rimarkinda estis la brila prezentado de S-ro Ito, farita de F-ino Visitación Martín, vicepresidente de M. E. K.

La Eduka Ministerio interesiĝis pri Esperanto kaj tial petis al iuj estraranoj de MEK informojn pri la Esperanto-movado.

K R O N I K O

VALLADOLID. — S-ro Cantalapiedra sciigas nin letere pri ekspozicio aranĝota en venonta septembro kaj pri la unuaj laboroj, por kolekti taŭgan materialon kaj serĉi konvenan lokon, entreprenitaj de la nova sed aktiva Grupo «Fido kaj Espero».

BENIPEIXCAR-GANDIA (Valencia). En la kadro de la Loka Grupo de la grava Klubo CCC, nia nova membro, S-ro Rafael Moral, organizis rondeton kun partopreno de kelkaj gejunuloj, kiuj, entuziasme komencis lerni Esperanton.

OLOT (Gerona). — S-ro Antonio Rodeja, Direktoro de «Grupo Escolar», inaŭguris pasintan jaron, kiel omaĝo al D-ro Zamenhof, Esperanto-kurson por infanoj. Pli ol tridek infanoj partoprenas ĝin profite kaj entuziasme, kaj nun ili legas kaj skribas kun plena ĝojo.

Olot estas urbo kie, ĝis nun, ni ne konis ekziston de esperantistoj, sed tiu sciigo estas tre bona aŭguro pri vigla komenca movado en tiu urbo.

VALENCIO. — La nombro da aliĝintoj por veturi aŭtobuse al la Kongreso en Pontevedra superas la lokeblon de granda aŭtobuso; tial oni komencas pritrakti la eblecon por aldoni alian aŭtobuson.

GIJON. — Sub la titolo «Esperanto estas ankaŭ gajeco», S-ro Ordieres, de la Esperanto-Grupo «Jovellanos», sendis al ni ĉi tiun raporton: Pasintan 13-an de marto, la E-Grupo «Jovellanos» de Gijón, en la tago de ĝia unua jarfondiĝo, festenis kaj amuzis sian junan E-membraron montrante, tiamaniere, ke Esperanto estas, ne nur sindono, sed ankaŭ ke, per ĝi, la esperantistoj povos ĝui, en frata kamaradeco, la plej bonajn nutraĵojn kaj trinkaĵojn, kaj danci kun belegaj kaj agrablaj brun-blond-junulinoj.

Se la interna sento petas ankaŭ, laŭvoĉe, kanti la dolĉan asturan folkloran popolkanton, nomata tie «Tonada», oni povas fari tion ankaŭ, kiel faris nia simpatia blondsamideanino C. Amez, kiu ravis nin treege per ŝia ĉarma voĉo kaj festgestoj, okazigante, tiel, grandegan ridon kaj plaŭdadon.

Ĉi-tiu E-Grupo esperas ke la venontan

jaron, ĝi festos ankaŭ, gaje kaj frate, sian duan datrevenon, kompreneble superante la unuan naskiĝdaton, post tutjara por-esperanta laborado.

BARCELONO. — Per letero de pasinta 15-a de marto, la Esperanto-Grupo de la Barcelona Kooperativo «La Andresense», informis al ni pri aranĝado de ekspozicio pri E-materialo vizitebla dum la tagoj 22-a ĝis 27-a en la salonoj de sia sidejo.

BURJASOT. — La 5-an de marto 1960, en la «Agrupación Musical «Los Silos», kie Esperanto-Rondeto havas sian ejon, faris interesan prelegon la prezidanto de Hispana Esperanto Federacio, D-ro Rafael Herrero, pri «La fontoj de malamo».

La klera preleganto komencis sian disertacion apogante sin en la fama persono de nia Luis Vives, por ekzalti la transcendon de Latino en la XVI^a jarcento, kaj rememoris la antaŭdiron de la valencia filozofo pri la urĝega neceso de komuna lingvo por la estonteco.

Sekve, li montris, per vigla persvada forto, ke «malamo tre ofte ne havas alian fonton ol la reciprokan malkonon inter la personoj, kaj, ke, por interkompreniĝi, estas necese paroli, kaj per tiu sprita interŝanĝo oni malkovras sennombrajn koincidajn punktojn; sed tio nur estas eble inter personoj uzantaj la saman lingvon». Kun plaĉo li instruis nin pri la alta servo, kiu Esperanto signifas por la tuta homaro.

Poste, li bedaŭris ke la ŝtatoj ne trudu ĝin, devige, en la lernejojn kaj, tiam, li demandis sin: «Kiom dirus Luis Vives se en plena XX^a jarcento li vidus nin enigitajn en ĉi tiu lingva ĥaoso, kiam en lia epoko. Latino jam taŭgis kiel komuna lingvo?» Fine, kaj per laŭdaj vortoj por la loka grupo Esperanto-Rondeto, li invitis la multnombrian ĉeestantaron, kiu plenigis la vastan salanon, por ke ili helpu ĉi tiun altan idealon, honoro kaj fiero de ĉiu bonvola homo. Forta kaj longa aplaŭdado premiis ĉi tiun neforgeseblan prelegon.

ESPERANTO - RONDETO

NOVAJ LIBROJ SUB LA EFIKO DE Kritiko

EROJ.—Originala Poemaro de Marjorie Boulton.—Kovrilo de John Hartley.—Portretoj de la aŭtorino, Stafeto: Beletro, 15. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Tenerifo, Kanariaj Insuloj. 1959.—16 x 22 cm.—368 paĝoj.—Prezo: 140 pesetoj.

La unuaranga Esperanta poŝtino de nove aperas per dika volumo, lukse prezentata de «Stafeto». Oni miras pro la profunda kaj ampleksa laboro de la aŭtorino kiu, laŭ la faldoklapo nin informas, verkis, post la apero de «Kontralte», tio estas en 4 jaroj, du verkojn en Esperanto, du en angla lingvo, du tradukitajn anglen, kun aliaj pli malgravaj... kaj plie, ŝia profesia laboro.

La verko konsistas el preskaŭ ducent poemoj. En sobra kaj sincera enkonduko M. Boulton nin avertas, ke «ili estas intense personaj» kaj ke «pri ili, ŝi neniam restis plenkontenta». Tio estas kondiĉo nur de bonaj aŭtoroj kaj ĝi plene precizigas la psikan portreton de la aŭtorino. Mi certe bedaŭras, ke la malmulta amplekso kaj ofteco de BOLETIN ne permesas, ke mi recenzu tiel gravan verkon kun la detalo al ĝi deca. Do, mi, rapide, laŭ filmo, prinotos la plej elstarajn detalojn.

«ERO» estas la nomo de la unua parto, kiu entenas kvar profundajn verkojn: *Tero, libero, vero* kaj *mistero*. Oni atentu, kiel ĝi ĵonglas pri la finaĵoj kaj la signifo. Estas kvar majstraj pecoj

Dua parto; «Provizore», estas vivresumo, pensiga kaj unueca poemo; entute dek ses kantoj, ĉiu dek ses versaj, poluritaj cizelitaj tercetoj. SUR NIA SANGA TERO. Trafaj bildoj pri nuntempaj malĵustajtoj: senŝtateco, milito, raso, landlimoj, pasportoj k. a. Pri la formo estas notinda nova triversa strofo, asonanca (en la unua poemo: *Venuso kaj la Vulkano*), tre artisma:

Sub Etno la forĝejoj muĝe *flamis*
Venuso kuŝis; la nudeco *lumis*
Vulkano staris apud ŝi. Li *lamis*.

Aliaj parencaj formoj ŝi uzis en *Vero*, ankaŭ per tercetoj kaj ankaŭ tre trafe. Junaj poetoj multe povos lerni pri rimarto en tiu ĉi verko «KVARPIEDA KONSONANTO» estas bildetoj pri katido; sed, kiel sub ĝia

velura piedeto, sin kaŝas akraj ungoj, sub tiaj petolaj versoj sin kaŝas trafaj, homaludantaj pensoj.

En «FOLIOJ DE ORA BRANĈO», oni kolektas diversajn, ĉefe amajn poemojn, inter kiuj mi ŝatas: «*Litantoj pri la manoj de l'amato*» kaj «*Homino*»n. Tiuj verkoj estas pli parencaj al «*Kontralte*». Ja, ĉiuj amaj verkoj funde similas, kaj ĉiuj malsimilas.

Preskaŭ same, mi diras pri «*Amkantoj laŭ minoraj gamoj*»; sed mi ne preterpasu «*Alispeca amo*», kiu konsistas el dek perfektaj sonetoj.

«*Momentoj kaj meditoj*» la plej multnombra parto, entute 55 verketoj, mallongaj, fulmaj vizioj pri floroj, bestoj, tagaj bagatelaĵoj, kie la aŭtorino ĉiam trovas iom por skui kaj skurĝi niajn etburgajn nervojn.

Kaj, finfine, dekdu portretoj de konataj esperantistoj, kolektitaj sub la titolo: «*Bildoj el nia albumo*», bone verkitaj per paraj versoj, plejparte naŭsilabaj, kelkaj dekunusilabaj. Pri la trafeco, kiel en ĉiu portreto, juĝu tiu, kiu konas la originalaĵojn.

Kompletigas la libron du tabeloj: *Glosoj*, klarigante dek ses novajn vortojn; el kiuj nur (*ambigua* kaj *kosmaro*) estas neologismoj; kaj *klarigoj* pri frazoj kaj propraj nomoj, aperantaj en la poemoj.

Bela kovrilo kaj senmakula eldono.

Amalia NÚÑEZ DUBÚS

ANTOLOGIO DE PORTUGALAJ RAKONTOJ.—

Kompilita de Manuel de Seabra. — Traduko de diversaj esperantistoj. Eldonis: Grupo de admirantoj de Zamenhof, por memori lian centjaron, Lisboa, 1959. 200 paĝoj, 60 pesetojn ĉe nia libroservo.

La libro, kiun ni recenzas ĉi tie, estas ora briko aldonita, de la portugalaĵ samideanoj, al la tutmonda celebrado de la Zamenhof-jaro.

Por ni, hispanoj, la libro havas specialan intereson, laŭ mia vidpunkto; ĝi donas, al ni, ekzemplon pri kuraĝo por entrepreni eldonadon de libroj, ĉar ni devas konstati ke la esperantaj eblecoj de niaj najbaroj ne estas tiel favoraj kiel la niaj.

La libro estas por mi kvazaŭ malkovro de la nuna portugala literaturo. Mi konfesas ke mi ne plene rilatiĝas kun la beletraĵ medioj, sed, en revuoj, kiujn mi legis, pri literaturo, mi trovis nek menciojn pri portugalaĵ verkistoj. Mi pensas pri kio

okazas en landoj pli malproksimaj lingve, fizike kaj spirite, kaj komprenas la vortojn de la kompilinto, en la antaŭparolo, kiam li diras ke «kelkaj -el la verkistoj elektitaj-meritas pli ekspansian esprimilon, ĉar ili estas, fakte, grandaj».

«Antologio de portugalaj rakontoj» enhavas 14 rakontojn, verkitaĵojn de 14 malsamaj portugalaj verkistoj, kaj tradukitaĵojn de samideanoj, kiuj bone regas Esperanton.

La lingvo estas klara kaj iom situanta ĉe la moderna linio kun akcepto de kelkaj vortoj, kiel olda, femalo, pigra, k. a., el la Suplemento. Malgraŭ la varieco de verkistoj kaj tradukistoj, la stilo estas unueca. Eble mankas en la kompilo aliaj pli optimismaj rakontoj, sed tio ne estas baro por klasifiki la libron inter tiuj rekomendindaj por esperantaj bibliotekoj.

ANGEL PEREZ

Esperantujo havas novan straton

El poezio sendita de S-no José Vidal el Cheste (Valencio) ni elektis fragmentojn kiujn ni publikigas sekve, ni bedaŭras ke la spaco ne permesas komplete publikigi ĝin.

Regu mian korojn ĝojo,
ke mia kara vilaĝo,
pri la Doktoro Zamenhof,
montras jam denove straton.

Estu kontent' en ni ĉiuj,
sincera ĝojo kaj gajo,
ĉar la stel' esperantista
verdas, krom sur nia flago,
ekde nun ankaŭ sur muro
blanka de nia vilaĝo.

De suno kaj vent' kisita,
ĉe bela marmorornamo,
sur muro verdas kvinpinte
l'emblemo de l'Esperanto.

Ni sentu sinceran ĝojon,
plenan kontenton kaj gajon,
ke Ĉeste pompe honoris,
en la Zamenhofa-Jaro,
de l'Esperanto kreinton
dum la inaŭgura tago.

PRI GALEGA FOLKLORO

Muziko, kanto, danco

La folkloro muziko galega estas trezoro preskaŭ ne ekspluatata. Plej tipaj estas «Alborada», «Alalá», «Muinjeira» kaj «Kanto de pandejro», kies tradukoj estas «Aŭroro», «Alalao» (tiuj silaboj estas oftaj en tiu ĉi muziko, kiam oni kantas sen vortoj, nur muzike), «Mueleja» kaj «Tamburinkanto».

Alborada estas himno al naskiĝanta suno. Solena kanto melankolia; ĝiaj notoj jen longiĝas dolore, jen rapidas kuraĝe, kreskas, malpliĝas, ĝis ili finiĝas per longa trista sono.

Alalá, same kiel aliaj kantoj galegaj, estas tre simila al germanaj baladoj. Ĝia tembro estas klara kaj ampleksa; tre simpla ritmo, plena de malprecizeco kaj sentimento.

Muinjeira, kontraŭe, estas vigla kaj gaja; ties versoj ritmas laŭ tre komplika maniero; plej tipa estas verso kun dekunu silaboj, kies ĉefaj akcentoj falas sur la kvara, sepa kaj deka silaboj (versoj nomataj «de galega sakfajfilo»). Dum interpretado de muinjeira oni ofte aŭdigas «aturuŝon», t. e., tranĉa stranga krio sovaĝa.

Tamburinkantoj havas kiel solan instrumenton, tamburino; estas strange ke virtuozaĵoj kapablas eltiri el ĝi tre variajn sonojn kaj ritmojn. La ĥoraj kantoj kiujn ĝi akompanas estas, ĉefe, el versotrioj oksilabaj, laŭ rimskemo a-a.

En la galega folkloro okazas kune muziko, kanto kaj danko. La kanto estas preskaŭ ĉiam ĥora, plurvoĉa. Plej tipa muzikilo estas la sakfajfilo; plej ofte ludas du fajfistoj kunaj. Dum la danco, ĉefe dum Muinjeira, la viro ekdancas sola unue, ĝis kiam li atingas la lokon kie staras la knabino kiun li elektas por kundancistino. Unu provas venki la alian per ĉiam pli malfacilaj piedturnoj, tute atentante la ritmon de la danco. Krom tio, la knabino ĉiam dancas modeste, brakoj malsupren: la viro, kontraŭe, devas vigle danci, turni ĉirkaŭ ŝi; ĉe la fino, la danco estas vigla por ambaŭ.

Sed ni haltas nian priskribon. Ĉu ni sukcesus, per multaj kaj multaj vortoj, klarigi la ĉarmon de nia folkloro? Evidente, ne! Do, venu mem ĝui ĝin ĉe ni!

DIVERSAĴOJ

Ĉiu membro de nia Federacio aŭ abonanto de nia bulteno, sendinta korektan solvon de enigmo, gajnos poenton. Gajnintoj de 5 poentoj ricevos libropremion. Ni akceptos solvojn ĝis la 20-a de Junio.

SOLVO DE LA ENIGMO N.º 1

Horizontale: 2 Kofro. 3 Pro. Laĉ. 4 Ranca. 5 Brodi. Ikter. 6 Kolapso. 7 Boju. Grio. 8 Pantero. 9 ikirT. Sojlo. 10 Moroĵ. 11 Tie. Ord. 12 Oazoj.

Vertikale: 2 Brogi. 3 Per. Kat. 4 Okupi. 5 Kordo. Armeo. 6 Ailanto. 7 Afin. Rozo. 8 Cipreso. 9 olakS. Roĵoj. 10 Togoĵ. 11 Ĉie. Lud. 12 Ruino.

Sendis korektajn solvojn: Alfred Kirch, Augusto Ugalde, R. Albero, F. Amorós, Vicente Santamaria, Francisco Aliaga, Alfonso Escamilla kaj Ramón Bastardas.

Atingis kvin poentojn: Augusto Ugalde kaj Vicente Santamaria. Al tiuj ni sendos libropremion.

ENIGMO N.º 2

Krucvorta enigmo de J. Devis
Sama figuro aperinta en nia
antaŭa numero

Horizontale: 2 Supro de kapo. 3 Montra pronomo. Nagbarelo, uzata en maro aŭ rivero, por signali danganon lokon. 4 Povo, pravigita de lego aŭ moro. 5 Ŝipeto kun kvadratforma poŭpo. Germana aŭ pola lancisto. 6 Manĝeblaj fruktoj de iu arbo, kies folioj servas por nutri la silkraŭpojn. 7 Konforma al la realo. Ŝovi la langon sur io. 8 Plena venko. 9 (inv) Aro da ludantoj por sporta konkurso. (inv) Glatigu metalon skrapante ĝin per speciala ilo, 10 Parto de la dika intesto malantaŭ la cekumo. 11 (Rad) Meblo per kuŝi. Infuzajo. 12 Ŝipo konstruita de Noa.

Vertikale: 2 Fermentinta trinkaĵo el ordeo klupolo. 3 Pli ol sufiĉe. Prefikso montranta ideon kontraŭan al tiu, kiun montras la radiko. 4 Adorata, ŝatata. 5 Aro da artikigitaj sonoj havanta difinitan signifon. Nekurba. 6 Inflamo de


la aorto. 7 Eraoj. Kaŭzi al iu impreson en la haŭto, pro kiu oni sentas la bezonon sin grati. 8 (Rad) Tiu, kiu kutimas tusi, 9 Antikva greka monereto. Ŝiparo sub la komando de admiralo, 10 Akragustaj bulboj uzataj kiel spicaĵoj. 11 (Inv) Malaserto. Grupo, amaso. 12 (Inv) Tio, kio efektive okazas.

TRADUKA KONKURSO N.º 1

La sendinto de plej bona traduko de ĉi tiu malgranda sed bela poemo, ricevos premion konsistanta el abono ĉijara al tre interesa eksterlanda revuo. Tradukojn devas atingi la redakcion antaŭ la 20-a de Junio. Prefere skribu sur poŝtkarto aŭ samgranda papero.

Del más hermoso clavel,
pompa de un jardín ameno,
el áspid saca veneno;
la oficiosa abeja, miel.

(Calderón de la Barca)



—La fianĉo: Ĉu vi donas al mi la manon de via filino?

—La patro de la fianĉino: Jes sinjoro, sed kondiĉe ke ĝi estu la manoj kiuj ĝi enmetas en miaj poŝoj.

AXONCETOJ

Germanino, 29 jara, deziras resti du aŭ tri semajnojn ĉe hispana esperantista familio, prefere en marborda urbo aŭ urbeto, bonvole ŝi pagos la gastigadon; interesatoj kontaktigu kun: F-ino Nora Hartuvich, Krögerstrasse 11, Frankfurt am Main (Germanio).

Deziras korespondi kun hispanaj geesperantistoj kaj interŝanĝi bildkartojn, universitata studentino: Vera Zlotnikova, Ekaterinskaja ulica 18/20 25. MOSKBA, J-110 (URSS).

Nederlanda samideano deziras korespondi kun hispanaj geesperantistoj. S-ro W. P. Dekker.—Uitweg, 13. KROMENIE. (Nederlandano).

Ni ricevis...

...ekzempleron de revuo de la Klubo «CCC». Sendis Instituto de Esperanto el Barcelono. Tiu Klubo serĉas originalan kaj ne publikigitan Esperanto-Kurson kun intenco rekomendi ĝian enkondukon inter la multaj kursoj de la Centro de Kulturo per Korrespondado «CCC».

...ekzempleron de ĵurnalo «El Pueblo Español, el Pueblo Vasco» de 24-3-60 kaj alian, kun artikoloj tradukitaj el Esperanto revuoj. Sendis S-no Santiago Arizmendi el Eibar.

...februaran numeron de «Actualidad Veterinaria» kun alvoko en Esperanto fare de Veterinara Esperantista Tutmonda Asocio. Sendis Antonio Alonso Núñez el Pontevedra.

VIVO SAMIDEANA

Al gesamideanoj Antonio Collado, nuntempe nia helpanto-sekretario, kaj Felisa Cucó, ambaŭ parolantoj dum multaj jaroj en la radio-programo de «La Voz de Levante» en Valencio, naskiĝis ilia unua filo Antonio, la 24-an de pasinta marto. Al la novaj gepatroj ni plej kore gratulas.

Nia estimata s-no Andres Candela edziĝis kun samideanino Maria del Milagro Alcover, ankaŭ el nia valencia rondo, pasinta 19-an de majo.

Al la nova esperantista paro ni deziras longdaŭran kaj feliĉoplenan vivon en lia nova stato.

Funebra sciigo

Kun ĝenerala surprizo ĵus mortis nia eminenta esperantisto D-ro J. Bremón Masgraŭ, (75 jara), pro koratako. Li estis granda pioniro de nia universala movado: Membro de la Lingva Komitato, Vicprezidanto de la societo «Espero Kataluna», ĉefredaktoro de «Tutmonda Espero», kaj aŭtoro de diversaj pedagogiaj verkoj: gramatikoj, vortareto, k. «Konversacia Lerno-libro». Krom tio, li estis unu el la organizintoj de la 5.^a Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono (1909). Lia perdo estas sendube tre grava por ĉiuj.

HEF funebros pro la ĉagreniga malapero kaj kondolencas lian familion, tre sincere.

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos recibidos desde el 21 de Febrero al 20 de Abril de 1960)

Suma anterior	1.141 Ptas
E. Wolf - Santa Cruz Tenerife	40 »
M. Buscató - Barcelona	10 »
M. Elezcano - Bilbao	25 »
J. Estañ - Granada	100 »
P. Moreno - Madrid	40 »
J. Anguita - Jaén	10 »
V. Rebollo - Barcelona	50 »
B. Serra - Barcelona	15 »
A. Jorgensen - Kobnhavn	100 »
M. Garriga - Tarrasa	25 »
J. Magriá - Barcelona	20 »
A. Pallarés - Arrecife de L.	22 »
J. Rodó - Barcelona	29 »
A. Gil - Vilviestre del Pinar	15 »
G. Lenaers - Valencia	15 »
E. Roca - Tarrasa	15 »
J. Guillomía - Barcelona	30 »
J. Herp - Barcelona	25 »
S. R. Docal - Washington	33 »
T. Estanislao - БЕРЕСОВСКОЕ	10 »
Suman	1.770 »

Libroservo de la Federaci6n Espa1ola de Esperanto

KANAKO EL KANANAM

(Aventuroj en la Ĝangalo de Novgvineo)

Originale verkita de

KENNETH G. LINTON

Anta1a Prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio

200 paĝoj

Tole bindita

140 pesetoj, afrankite



Mendu glumarkojn por propagando de nia Kongreso!

Diverskolora folieto kun 8 gm: 1.50 ptoj.

Proksime aperos kvinkolora P. K.

Kun belega desegno.

Prezo: 1.50

VOCABULARIOS

Esperanto - Espa1ol

(85 Ptas.)

Y

Espa1ol - Esperanto

(75 Ptas.)

del Dr. E. TUDELA FLORES

Pedidos al autor:
RUZAFa, 45 - VALENCIA

“NIA STELO”

INTERNACIA PORTUGALA
ESPERANTA GAZETO

Abono por 12 numeroj:
72 ptoj.

HISPANA PERANTO:

S. COLLADO

SAMA DE LANGREO (Oviedo)

CURSOS DE ESPERANTO por Correspondencia

de la

Federaci6n Espa1ola de Esperanto

Calle Forn, n.º 19 MOYA (Barcelona)

Centro autorizado por el Ministerio de
Educaci6n Nacional, n.º 63

KULTURAJ KAJEROJ

Dumonata informada kaj
kultura revuo

Ne similas al Ĵ per sia enhavo
aliaj revuoj Ĵ per sia prezo

JARABONO: 40 PESETOJ

sendotaj al: S-ino J. Monter Palomar
Muntaner, 416, 1.º, 1.º - BARCELONA

Proveksemplero havebla: sendu 1 rpk. al:

KULTURAJ KAJEROJ

5 Boulevard Buisson Rochefort-sur-mer.